★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Refleksivaj pronomoj

**Prelegonto: Milan Kolka**

Ripetado de uzo de refleksivaj pronomoj en Esperanto. Diferencoj inter uzo de refleksivaj pronomoj en Esperanto kaj en la ĉeĥa. Ekzercado.

**La programo estas taŭga por komencintoj.**

**Vhodné i pro čerstvé esperantisty.**

Ĉeesta programo. Estas registrota.

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 19-an de aprilo 2022 je la 18-a h.

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Cetera programo en aprilo

La 26-an **Konjugacio en la ĉeĥa kaj la supra soraba lingvoj** – Milan Kolka. Rete per Skajpo

## Programo en majo

La 3-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita* . Občanský klub, Hybešova 65a
La 10-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita* . Rete per Skajpo
La 17-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Občanský klub, Hybešova 65a
La 24-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Rete per Skajpo
La 31-an **Historio de Ukrainio** – Oldřich Arnošt Fischer. Občanský klub, Hybešova 65a
Mi petas vin, ke vi proponu programon por resto de aprilo kaj por majo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.

★

## Ni rekomendas

- **LASTA ALVOKO!** Por ke ni bone regu nian lingvon, ni bezonas uzi ĝin. Unu eblo de uzo estas legado de esperanta literaturo. Bedaŭrinde pro sendokostoj homoj preskaŭ ne aĉetas alilandan E-literaturon. Nia klubo povas al vi peri aĉeton de libroj el **Bjalistoka e-butiko**. Pli da informoj vi trovos ĉe https://butiko.esperantobrno.cz/content/8-nakup-zahranicni-esperantske-literatury. Se vi ankoraŭ hezitas, ĉu aĉeti, ni citu Tomasz Chmielik: "Aĉetu verdajn librojn, eĉ se vi ne volas legi ĝin." Sed prefere aĉetu kaj legu. Nur tial vi povas daŭrigi eldonadon de esperanta literaturo.
- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ

esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.

- **NOVA!** La 2–10 an de Julio, 2022 **Somera Esperanto-Studado,** Trenčín, Slovakio bona okazo plibonigi sian lingvonivelon kaj paroligi sin. Kutime partoprenas ĉirkaŭ 200 homoj el multaj landoj.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Milan Kolka
prezidanto